

3. Problemon inter difino kaj nacilingvaj terminoj montras ankaŭ la nocio: 08244 Tuto de ĉiuj teknikaj ekipaĵoj, de organizado kaj de reguloj, por garantii sekurecon kaj ekonomiecon de fervoja ekspluatado.

ĉeĥa	návěstění	itala	segnalamento
dana	signalering	pola	sygnalizacja
franca	signalisation	rumana	semnalizare
germana	Signalwesen	serba	signalni sistem
hungara	biztosítóbiztosítási rendszer	Esperanto	signalad sistemo

terminŝanĝaj proponoj: **1) signal-sekuriga sistemo**
2) signal-sekurigaj aferoj

Noto: Tre malfacilas trovi senc-elementon en la difino, kiu pravigas la radikon „signal-“ en termino, kvankam signaloj ja estas tre gravaj elementoj por sekurigo.

Retpaĝoj pri UIC-formularoj

Prelego de kolego *Zlatko Hinšt* pri Esperanto-tradukoj de formularoj pri financa statistiko de UIC kaj en Respubliko Kroatio, okazinta dum 59-a IFEF-kongreso en Parizo, estas preparita en reta formo. Vi povas uzi du retadresojn de IFEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo)

www.ikef.info aŭ www.ikef.org

por trovi konceman ttt-paĝon, kaj klaki en kadro de menuo sur eldoni sub titolo NOVA: Formularoj de UIC pri financa statistiko.

Anticipe ĝojante pri ĉiu via kontribuo, elkore deziras agrablan reston de la somero kaj amike salutas

via *Heinz Hoffmann*.



Intervjuo; ni atendas vian respondon!

Terminara Kuriero

TeKu 131

Julio 2007

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

Terminologiaj kongresrezultoj en Parizo

Karaj gekolegoj, por nia Terminara Sekcio elstaris la fakto, ke la kongreso okazis en urbo kun la sidejo de Internacia Fervojunio UIC. Pro tio kolegino *Rosalinde Taucher*, responsa pri la fervoj-terminologia datumbanko de UIC, povis akcepti nian inviton partopreni la kongresan inaŭguron. Ŝia salutparolo komenciĝis eĉ per vortoj en Esperanto. La tuta teksto troviĝas en la kongreslibro. Impresis ŝin la granda kaj entuziasma ago de IFEF. Mi ankaŭ uzis antaŭtagmezon por trakti kun ŝi plurajn trovitajn problemojn en la terminaro. Laŭ plano de UIC estas kolektata enhava materialo por la kvara eldono de datumbanka CD-ROM-disketo ĝis fino de 2007. Iam sekvontjare la disketo aperu.


En kunsido de Faka Komisiono, terminologino *Sonia Amariglio* (Francio) afable deklaris sian pretecon helpi nin pri ĝeneralaj terminologiaj demandoj. Kolego *Pavel Boevski* (Bulgario) deklaris estiĝi terminara kunlaboranto. Pro sia ago, kolego *Rolf Bergh* (Norvegio) deziras ĉesi kunlaboron. Ni elkore dankas kaj pro labor-pretecoj kaj ankaŭ pro farita agado.

Dum traktado de terminoj laŭ la taskoj en TeKu 130, la partoprenintoj decidis novajn solvojn por la nocioj 00701 kaj 09805:

En la nocio 00701 temas ne ĝenerale pri „du trakoj“, sed speciale pri **trakparo**. En trakparo estas destinita unu trako por la direkto A – B, la alia por la direkto B – A (laŭsenca trafiko). La alidirekta trakuzo (kontraŭsenca trafiko) estas escepto. Sed ekzistas ankaŭ plurtrakaj fervojlinioj sen direkto-destino de unupaj trakoj.

En la maldekstra skizo estas videbla parto de du-traka fervojlinio, kies trakoj ne estas trakparo. Temas pri „duoble unutraĵa trafiko“, unu trako por vartrajnoj, la alia por pasaĝertrajnoj, ambaŭ trakoj por ambaŭ direktoj. Tie ne povas okazi kontraŭsenca trafiko.

La dekstra skizo montras parton de kvartraka fervojlinio konsistanta el du trakparoj – en lando kie dekstra trafiko estas laŭsenca.



En la kazo 00701 ankaŭ por escepto de kontraŭsenca trafiko ekzistas signalteknikaj sekuriginstalaĵoj.

La kongresanoj decidis la terminon **trafiko partrake ambaŭsenca**. „Ambaŭsenca” signifas „kaj laŭsenca kaj kontraŭsenca”.

Por la nocio 09805 estas decidita la termino **trako akcesora**. La adjektivo „akcesora 2” laŭ PIV signifas „helpa, kvankam malpli grava ol io alia”.

La ĉeestintoj decidis ankaŭ

- | | |
|---------------------|--|
| • por nocio 00070 | la solvon 2) = trafiko perturbkaze unutraka , |
| • por nocio 01686 | la solvon 3) = trafiko portempe unutraka , |
| • por nocio 05580-0 | la solvon 3) = antaŭsignalila karakterizplato , |
| • por nocio 05580-1 | la solvon 2) = antaŭsignalila anoncplato , |
| • por nocio 06365 | la solvon 3) = signalilkarakteriza plato , |
| • por nocio 08204 | la solvon 1) = mansignalo , |
| • por nocio 08227 | la solvon 2) = signalilo ripeta , |
| • por nocio 09393 | la solvon 3) = kructrakforko dudevia kaj |
| • por nocio 09398 | la solvon 3) = kructrakforko unudevia . |

Eblo modifi UIC-difinojn:

Principe oni kreu terminojn surbaze de difinoj. Sed plurfoje mi konstatis ĉe datumbanka nocio, ke ĉiuj ties nacilingvaj terminoj – sufiĉe klare tradukitaj – ne respondas al la UIC-difino kun iom dubinda teksto. Du tiajn problemojn mi traktis kun kolegino *Taucher*. Jen la rezulto:

- a) UIC modifis la difinon al 06987 = **pupitro kondukista** de „Parto de enveturila regaĵo kiel limajo inter trakciilkondukisto kaj veturila sistemo, kiu transformas alvenantajn signalojn en indikojn, kaj transformas enigajn ordonojn en signalojn por la enveturila komputilo” al „... indikojn, kaj transigas enigajn ordonojn al la veturiltekniko, eventuale transformas ilin en signalojn ...”, ĉar ne ĉiuj trakciiloj enhavas komputilon.
- b) UIC tute eligis la difinon al 02967 = **restadotempo (varvagono)**, kiu erare troviĝis sub 08376 = haltodaŭro de trajno (TeKu 126, paĝo 4 kaj TeKu 127, paĝo 2), ĉar neniu nacilingva termino mencias kargadmalfruiĝon. Sekve mi nuligas nian termindecidon „vagonrestado pro kargadmalfruiĝo”. Restas la ĝisnuna termino.

Du aliaj tiaj problemoj rezultas el la difinoj al 05003 kaj 05004 (TeKu 130, paĝo 3). La kongresanoj konstatis, ke ĉiuj indikitaj nacilingvaj terminoj koncernas agon, sed la difinoj koncernas ilon. Pro tio estis decidate, proponi al UIC modifon de ambaŭ difinoj jene:

- 05003 Manipulo de perturbita aparato per mekanismo funkciigebla sub determinitaj kondiĉoj.
- 05004 Manipulo de aparato per alia aparato ebliganta la funkciigon nur post antaŭfiksita tempolimo.

Novaj taskoj por vi kunlaborantoj

1. De la lastaj linioj sur la antaŭa paĝo rezultas jenaj novaj terminproponoj por diskuto kaj elekto:

05003	1) substitua funkciigo	2) substitua manipulo
05004	1) prokrasta funkciigo	2) prokrasta manipulo

2. Pri grandrapida trafiko ekzistas du diversaj nocioj:

08982 Rapidaj interligoj per vojevada transportsistemo, por kiuj specialaj veturvojoj kaj veturiloj estas konstruataj.

ĉeĥa	<i>rychlá doprava</i>	itala	<i>traffico ad alta velocità</i>
dana	<i>højhastighedstrafik</i>	pola	<i>przewozy ekspresowe</i>
franca	<i>trafic à grande vitesse</i>	rumana	<i>trafic de mare viteză</i>
germana	<i>Hochgeschwindigkeitsverkehr</i>	serba	<i>saobraćaj velikim brzinama</i>
hungara	<i>nagysebességű forgalom</i>		

terminŝanĝa propono: **trafiko grandrapida**

Noto: El la ĝisnuna termino „rapidtrafiko” oni eventuale komprenas nur trafikon de rapidtrajnoj.

09012 Trafiko grandrapida, por kiu validas specialaj reguloj (ekzemple malpermeso de samtempaj manovraj veturoj).

ĉeĥa	<i>vysokorychlostní doprava</i>
dana	<i>højhastighedstrafik</i> (kiel 06982)
franca	<i>trafic à très grande vitesse</i>
germana	<i>Schnellstverkehr</i>
hungara	<i>igen nagy sebességű forgalom</i>
itala	<i>traffico ad altissima velocità</i>
pola	<i>ruch dużymi prędkościami</i>
rumana	<i>trafic de foarte mare viteză</i>
serba	<i>saobraćaj vrlo velikim brzinama</i>

terminŝanĝa propono:

trafiko grandrapida kun restriktioj

Noto: La nacilingvaj terminoj kaj la ĝisnuna Esperanto-termino „trafiko grandrapida”, laŭ kiuj la rapidoj sub 09012 estas pli grandaj ol la rapidoj sub 08982, kontraŭas al la difino kompreniganta, ke sur la linio okazas kaj trafiko sub normalaj kondiĉoj kaj grandrapida trafiko kaŭzanta restriktiojn.



Kongresejo kaj hotelo „Maurice Ravel” en Parizo